



'Nova Urbo'

UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

> Ni pontu <

Juan Manuel Santos estis elektita la prezidento de Kolombio en junio 2010 kaj, du jarojn poste, lia registaro eniris dialogon kun FARC (*Fuerzas Armadas Revolucionarias de Colombia* / Revoluciaj Armitaj Fortoj de Kolombio) por kune serĉi solvon de la multjara sanga konflikto. J.Santos ne volis ripeti erarojn de la antaŭaj ŝtat-gvidantoj kiuj malsukcesis atingi batalfinon inter la armitaj ribelantoj kaj kolombia armeo. Unue li certigis, ke Kolombio ekstradicios neniun ribelanton al eksterlanda juĝejo(-j). Tio estis turnopunkto kaj solida bazo por daŭrigo de la interparoloj*. S-ro Santos ne retiris tiun promeson, malgraŭ ke la antaŭa prezidento Álvaro Uribe kritikis lin pri la intenco atingi pacon "je ĉiu kosto" – kontraŭe al liaj antaŭuloj, kiuj malakceptis interparoli kun la rebelintoj.

Longa vojo al paco

La negocoj estis organizitaj en Havano kaj daŭris kvar jarojn: ekde aŭgusto 2012 ĝis fino de lasta somero. Oni uzis tiel longan tempon, ĉar la preparolitaj problemoj estis tre malfacilaj. La subskribita traktato inkluzivas i.a. agrikulturan reformon, plian partoprenon de popolo en politiko, halton de ambaŭflankaj bataloj, solvon de la kontraŭleĝa drogvendado kaj helpon al ties viktimoj.



Prezidento Juan Santos kaj FARC-gvidanto R.L.Echeverri, konata kiel Timoleón Jiménez



En lasta septembro prezidento Santos anoncis atingon de la konsento inter FARC kaj kolombia registaro, kio baziĝas je "vero kaj repaciĝo". Aliflanke, pro la krimoj okazintaj dum jaroj de la konflikto, la farintoj rekonas sian kulpon kaj por tio akceptas la respondecon. "Mi pardonpetas por ĉiuj doloroj, kiujn ni kaŭzis dum ĉi tiu milito" - konfesis la gvidanto de FARC. Pro justeco, tiajn agojn oni ne povas ignori (laŭ jura sistemo de antikva Romio: *Punitur quia peccatum est* – Oni punas, ĉar krimo estas farita).



La interkonsento subskribita en Havano, la 23an de junio 2016.

Tamen, por interrompi la ĉenon de perforto kaj evitigi venĝojn, la krim-farintoj senpage laboros serve al la socio kiel volontuloj, anstataŭ esti juĝe punitaj kaj pasigi multajn jarojn en malliberejo.

< Maldekstre:

Interkonsento, kiu finas la 52-jaran militon. Maldekstre staras ĝen. Direktoro de UN, Ban Ki-moon, meze - prezidento de Kubo, Raul Castro.

La decido estis kuraĝa sed ankaŭ tre riska. Ĉiuj scias, ke FARC estas la ĉefa kaj plej granda organizaĵo kiu dum jardekoj batalas kontraŭ la kolombia registaro. Ili soldatigis milojn de malriĉaj homoj, inkluzive junajn virinojn kaj pli ol 6,000 infanojn.

FARC, kun kelkaj similaj ribelgrupoj, respondecas pri multegaj murdoj, pri forkaptado de soldatoj kaj de simplaj civitanoj postulante elaĉeton de la viktimoj.



Post jaroj, ne eblas trovi eĉ tombojn en ĝangalo



Milionoj devis forlasi siajn domojn

La ribelantoj rabis bankojn, altrudis senleĝe impostojn, produktis kaj organizis fikomercan distribuadon de kafeino kaj de aliaj drogoj. Nur en jaro 2012 (kiam la prezidento Santos komencis interpa-rolajn por fini la militon kaj kontaktis la ribelantojn), FARC atakis 239-foje la energiproduktajn konstruaĵojn kio kaŭzis grandan disverŝon de kemiaĵoj kaj poluis riverojn.



Fine de la pasinta jarcento, la ribelantoj el FARC estis kondamnitaj internaciskale, post kiam ili entrudiĝis al teritorio de la indiana tribo *U'Wa* (esperante: uŭa). Tiutempe ili peforte rekrutis la indiĝenan junularon al siaj bataliojn. Kiam la tribestroj protestis, la ribeluloj ilin mortigis.

La tribo *U'Wa* nombras pli ol 7,000 homojn, kiuj vivas en *nubarbaro* de nordorienta parto de Kolumbio, ĉe la limo kun Venezuelo. (Pri nubarbaro vi povas legi en la ĉapitro de „Nia Vilaĝo”).

La 2an de oktobro okazis ĝenerala referendumo, per kiu iom pli ol duono de la voĉdonitintoj kontraŭis tiun traktaton. Tia rezulto estis malfavora al Juan Santos kaj puŝis lian landon je rando de malcerteco. Aperis la reala danĝero, ke la porpacaj streboj malsukcesos kaj la milito ekflamos denove.

La interna milito en Kolombio estas la plej longa en nuntempa historio kaj unusola en ambaŭ Amerikoj. Fakte, la voĉdonantoj ne diris "ne" kontraŭ paco, sed nur kontraŭ la tiel formulita traktato. Tio signifas ke le porpaca dialogo ne estas fermita.



Multaj protestoj okazis kontraŭ la unua pac-traktato

Komprenis tion la prezidento kaj, je sia propra respondeco, ratifis la dokumenton. Tre gravas, ke ambaŭ flankoj, gvidataj de prezidento Santos kaj de R.Londoño el FARC-gerilanoj konfirmis ke, malgraŭ tiuj malfacilaĵoj, la batalpaŭzo estos observata.

Nur post kelkaj tagoj, tiun kuraĝan decidon apogis la norvega Nobel-komitato kaj honorigis prezidenton Santos per sia prestiĝa "**Medalo por Paco**". Juan Santos komparis ĝin al "donaco de ĉielo" ricevita en ĝusta momento. La Komitato substrekiĝis, ke la premion oni konsideru kiel tributo de respekto al kolumbia nacio kiu, spite al suferoj kaj malbonaĵoj, ne perdis esperon je justeco kaj paco. Tiumaniere oni volas ankaŭ memori pri la sennombraj viktimoj de tiu interna milito.



Oni alte aprezas gravecon de la fakto, ke prezidento Santos invitas ĉiujn partiojn de la konflikto ke ili partoprenu en larĝa nacia dialogo por antaŭenigi la porpacan proceson en Kolombio. La invito estis sendita ankaŭ al tiuj socigrupoj kiuj kontraŭstaris la traktaton, al reprezentantoj de familioj kiuj perdis siajn parencojn kaj al viktimoj de la civila milito.

Atingi ekvilibron inter la nacia repaciĝo kaj soifo al justeco flanke de la milit-viktimoj estos la defio precipe malfacila. Ne ekzistas simplaj respondoj al tio. Profunde impresis la ĉeesto de la krimfarintoj fronte al viktimoj kiuj atestas pri siaj spertoj: travivitaj teruraĵoj kaj krueleco kontraŭ la sendefendaj homoj.

La Komitato esperas ke la Paca Premio fortigos la strebojn de la prezidento al malfacila repaciĝo de la nacio. Estas dezirinde, ke ĉiuj partioj dividu respondecon por daŭrigi la komencitan vojon al paco.

Tiun sangan konflikton finos la kontrolebla malarmigo de la ribelantoj: FARC deklaris komplete disarmiĝi dum ses monatoj ekde kiam la traktato estis subskribita.



Duobla ĝojo en Kolumbio: la prezidento ricevis Nobel-premion kaj Nacia Kongreso aprobis la korektitan traktaton.

Post ricevo de la porpaca Nobel-premio, multaj novaĝ-agentoj volis la prezidenton Santos intervjui. Unue, oni demandis lin ĉu, post tiom da teruraĵoj kaj masakroj, la tuta nacio akceptos la interkonsenton kiun li subskribis. Juan Santos respondis: *'En proksima estonteco, pli kaj pli kolombianoj ekvidos la fruktojn de paco kaj ili aprezos la normalan, senmilitan vivon. Nur tiam ni povos solvi la plej gravajn defiojn kiel malriĉeco, socia maljusteco kaj krimo organizita por kontrabando de drogoj'*. Sekva demando koncernis tiujn krim-agintojn kiuj estos eble vokitaj aperi en eksterlandaj juĝkortumoj. Kion faros la kolombia registaro, troviĝonte sub granda premo flanke de iu potenca ŝtato? *'Certe ne okazos ekstradicio kaj neniu el ili estos deportita eksterlanden. Tion ni promesis, ili kredas je nia vorto kaj ni devas plenumi tiun promeson'*. – sonis la respondo.

*

“**Nova Urbo**” (Città Nuova / New City) estas internacia socikultura magazino de Fokolara Movado, kiu antaŭenigas ideojn kaj konkretajn projektojn serve al reciproka kompreno kaj unueco en familioj, komunumoj kaj – je pli vasta skalo – inter homoj de diversaj nacioj, kredoj kaj sistemoj. Fondinto de tiu movado, Chiara Lubich ricevis UNESKO-premion por Paca Edukado en decembro 1996. Sekvajare, dum la vizito de Ch. Lubich en Usono (majo 1997), ni havis la okazon renkonti ŝin kaj peti pri la konsento eldonadi la bultenon “Città Nuova / New City” ankaŭ en Esperanto. Kun helpo de pola esperantisto kiu doktoriĝis en Italio pri juro kaj komunikado, ni klarigis ke Esperanto funkcias same kiel aliaj naciaj lingvoj kaj bone utilas al internacia kompreno. Samtage, ni ĝoje ricevis ŝian aprobon kaj ekde tiam “Nova Urbo” aperas kaj informas pri pozitivaj eventoj en diversaj partoj de la mondo. Akceptis ĝin bone la esperantistaj legantoj, ĉar ankaŭ nia Internacia Lingvo kontribuas al amikeco kaj paco.

C. Montoya:

Kolombio – la popolo retrovas pacon.

Pacon en Kolombio kontraŭas* la interna milito, komencita antaŭ pli ol 50 jaroj. Ĝi estis unu el la plej longaj en historio kaj kaŭzis morton de 220,000 homoj (inter ili, pli ol 10,000 de la kontraŭ-infanteriaj ter-minoj. Tiu kunfrapiĝo kaŭzis evakuadon de pli ol 5 milionoj kaj 25,000 estis oficiale registritaj kiel 'desaparecidos' (malaperintoj). Ni ne povas konsideri tiun konflikton kiel nuran serion de bataloj en klare dividita milit-fronto. Ja ĝi, tra jardekoj frapas la tutan publikan vivon: kulturon, ekonomion, edukadon; ĝi vundas familiojn kaj kripligas infanecon de tiuj plej junaj. Se iu vivas en lando, kies reputacion makulas perforto dum tri generacioj – tia homo devas eniri profundan transformiĝon, dum la pensado pri fido, sindono kaj dankemo ŝajne malaperis.



Cristina Montoya laboras kiel esploranto en socia komunikado kaj politika sciencoj ĉe Sophia Universitato

Tamen la milito ne ĉion detruis: naskiĝas multaj iniciatoj, homgrupoj kiuj laboras por rekonstrui la socian veftaron, kreemo kaj fido ke Dio akompanas homaron en ĉiu historia momento.



El verkaro de Ch. Lubich, Cristina rememoras iom da okazintaĵoj kiuj fortigis multajn homojn en Kolombio, lando disŝirata per sangaj konfliktoj. Jen kelkaj rakontetoj kiuj priskribas la renaskiĝantan esperon.

Rosa vivas en periferio de Medellin (eo: Medeĝino), la pli ol 3-miliona urbego, kiun plef forte sufokas perforto kaj plago de organizita krimo. Ŝian filon murdis lia kolego, por kio la tipa reago estus venĝo. Sed homo aprezanta trezoron de la vivo kapablas grandanime pardoni. Tiu vundo konstante doloras kiel pikilo, tamen Rosa respondas per aktivado en la distrikto. Kaj tio signifas labori por la repaciĝo.

Alia persono nomiĝas Nubia kiu devis forkuri antaŭ tagiĝo, kiam la ribelantoj eniris la urbeton. Tiu graveda virino kun sia adoleska infano devis forlasi domon, kampojn kaj kion ajn ŝi posedis. Ŝiaj edzo kaj plejaĝa filo jam perdis la vivojn dum laboro sur ne sekurigita konstruaĵo. Rondo de fokolaraj geamikoj ŝin subtenis dum jaroj kaj tio donis al Nubia forton por komenci la vivon denove.

Gazeton forĵetitan al rubujo trovis viro 78-jara kaj legis belan historion de Kristnaska Festo. Kuraĝigis lin, ke la fokolara ideo pri unueco naskiĝis ankaŭ dum la milito.

Paco mem ne aperas el nenio, ĉar unue justeco devas esti restarigita; due - necesas trovi kaj forigi kaŭzojn de la konflikto. Tion faris Macudonio kaj Gabrielina kiuj sian malriĉan domon transformis je socia centro. En ĝi funkcias nun flegejo, postlerneja legĉambro kaj oficejo por arkitektura renovigo de la urbo. Alia estonteco devas esti kreita, komence kun edukado kaj bonvola divido de posedaĵoj por la plej malriĉaj familioj. La tiam konstruita infanĝardeno estas nun mezlernejo por 400 geknaboj kaj edukejo por plenkreskuloj kiuj laboros por la plurisma Kolombio.



Ekde tiam naskiĝis multaj iniciatoj kaj ekaktivis la homoj kiuj neniam antaŭe partoprenis en la socia vivo. Per sia karismo, Chiara Lubich antaŭvidis ke amo transiros multajn barilojn kaj pavimos la vojon al paco.

Same asertas Rafael Grasa, prezidanto de Internacia Pac-Instituto en Katalunio (nordorienta Hispanio), nuntempe laboranta kiel profesoro en Medeĝino: "Paco komenciĝas de popolo, en ties interpersonaj kaj grupaj rilatoj. Ĝia trajto ne estas stagna sed dinamika kaj tial paco tre gravas al kreado de harmonio en ĉiu homo, en socio kaj en la naturo".

Multaj atendas, ke la subskribota* en Havano traktato inter la kolombia registaro kaj FARC (Revoluciaj Armitaj Fortoj de Kolombio) helpas tiun nacion lerni denove la vivon en paco, spite al ĝia dolora pasinteco.

* Ĉi tiu artikolo aperis kelkajn monatojn antaŭ la traktato subskribita la 25an de aŭgusto 2016 en Havano kaj konfirmota sekvamonte en Kolombio.

En ĉi tiu numero troviĝas pli da literaturaj legaĵoj, inter alie pro la kulture gravaj datrevenoj. Antaŭ 100 jaroj, en la sama monato de novembro, mortis du grandaj verkistoj: Henryk Sienkiewicz en sia 70-jaraĝo kaj Jack London kiu travivis nur 40 jarojn. Inter iliaj vivoj okazis ankaŭ alia koincido: kiam London naskiĝis en Kalifornio, samtempe tra tiu ŝtato veturis la 30-jara Sienkiewicz, sendita el Varsovio por verki raportaĵojn pri sia vojaĝo. Sed biografioj kaj verkoj de la du verkistoj tute malsamis. La horizonto de London limiĝis al lukto de aventuristoj kontraŭ kruelaj fortoj de la naturo, dume Sienkiewicz pentris vastan panoramon de la pasintaj epokoj, inkluzive antikvan Romion. London komencis la verkistan karieron sojle de la 20a jarcento, kiam Sienkiewicz estis jam rekonita kiel granda verkisto, honorigota baldaŭ per literatura Nobel-premio. Malgraŭ tiuj diferencoj, verkoj de ili du apartenas al pintaj atingiĝoj de la nuntempa monda literaturo. Unue ni prezentas tiun pli junan, anglalingvan aŭtoron kies libroj malofte estis tradukataj al Esperanto.

Jack London (1876-1916)



Jack London (vera nomo: John Griffith Chaney), naskiĝis en San Francisco kaj komencis labori infanaĝe, ĉar hejme ekmankis mono. Lasinte laboron en fabriko de konserviĵoj, Jack pruntis monon de sia duonpatrino kaj en jaro 1889 aĉetis ŝalupon por ŝtelĉasado de ostroj. Poste li priskribis tiun sperton en sia aŭtobiografia rakonto "La krozado de Dazzler" (*The cruise of the Dazzler - Rememoroj de alkoholikulo John Barleycorn*). Kiam lia boato neripareble difektiĝis, London trovis laboron ĉe Kalifornia Fiŝ-Agentejo. Sekve oni dugnis lin en skuno (skunŝipo - ang: *schooner*) kiu estis sendita al japanaj oceanbordo por fokĉasado. Kiam London revenis hejmen, Usonon frapis granda ekonomia krizo. Oni fermis multajn fabrikojn, laboristoj komencis strikadon kio influis popularecon de la socialismaj ideoj. Por London, la nekvalifita laboristo, la situacio estis des pli drama.

Li enskribiĝis al Oaklanda Mezlernejo kaj verkis sian unuan artikolon "Tajfuno ĉe la japana marbordo". En vesperoj li vizitadis havenan drinkejon kaj revis pri universitataj studoj. Tie li vidis kaj aŭskultis multajn maristojn kiuj rakontis pri la ebleco gajni grandan fortunon per serĉado de oro. Tamen London havis aliajn planojn, ĉar sukcese pasis ĵus ekzamenojn kaj aŭtune 1886 estis akceptita en Kalifornian Universitaton. Bedaŭrinde, sekvajare li devis forlasi la studojn pro la malbona financa situacio. Revenis la fantaziaj rakontoj pri or-serĉado, instigis lin eniri la vivon de trampo kaj somere 1897 ekvojaĝi al Jukonio.



Kabano en kiu loĝis J.London.
Nuntempe ĝi estas parto de la muzeo en Dawson.

En la regiono de Klondike (kanada Jukonio, teritorio najbara kun Alasko), oni ĵus malkovris "vejnojn de oro" kaj komencis digi la unuajn ormineojn. La vivo montriĝis tie tre malfacila. Mankis vitaminoj kaj taŭgaj manĝaĵoj. Klimato severis kaj la aventuremulojn turmentis malsanoj. Tia sorto frapis ankaŭ London kiu eksuferis de skorbuto, artikoj kaj muskoldoloroj, fine ankaŭ pro la vizaĝ-frostiĝo. Por tiaj malfeliĉuloj, helpon organizis pastro William Judge kiu provizis al ili manĝaĵojn kaj medikamentojn.



P. William Judge

Li prizorgis tiujn homojn en la speciale preparita ŝirmejo, kiu poste transformiĝis je Hospitalo de s-ta Maria. Pastro Judge estis poste nomita la "Sanktulo de Dawson" kaj lia agado inspiris London verki la libron "To build a fire" (*Konstrui fajron*).

Jack London renkontis tie multajn or-serĉistojn kies rakontoj fariĝis poste la bazo de lia verkado.



Venis printempo 1888 kaj, sukcesinte travivi la vintrajn suferojn en Jukonio, Jack London kun aliaj du viroj ekvojaĝis boate laŭ fluo de Jukon-rivero. Post 21 tagoj la triopo atingis Beringan Maron kaj London eniris vaporŝipon pro reveni al Kalifornio.

< Maldekstre: Multaj esperis fariĝi riĉuloj en Klondike.

Reveninte al San Francisko, Jack eksciis pri morto de sia patro kaj tial li mem devis subteni la tutan familion. Denove li ne povis trovi laboron, ĉar en Usono plu daŭris la grandega ekonomia krizo. Sian lukton kontraŭ malriĉeco li priskribis en sia aŭtobiografia ĉefverko "**Martin Eden**" – eldonita nur kelkajn jarojn antaŭ la morto.




En 1900 London edziĝis kun Elizabeto Maddern kaj dum la sekvaj jaroj naskiĝis al ili du filinoj. Sed tiutempe li daŭrigis amikrilatojn ankaŭ kun alia virino. Anna Strunsky estis bela filino de judaj enmigrintoj el Rusio. Tiam el Ruslando multaj judoj elmigris al Usono kaj en tiuj rondoj vigle cirkulis socialismaj ideoj. Per oftaj kontaktoj kaj interparoloj kun Anna, ankaŭ London fariĝis entuziasma socialisto.

Malgraŭ ke lia geedziĝo disfalis, London neniam forlasis pensadon pri sociaj problemoj kaj en siaj libroj li ofte priskribis mizeran vivon de la vagantaj senlaboruloj. Post malsukcesa provo kun diversaj okupoj, London decidis fokusiĝi nur je verkado.

Tiutempe oni ĵus konstruis grandajn presmaŝinojn, kio ebligis amasan produktadon de periodaĵoj. La nova teknologio montriĝis bonŝanca al Jack London, kiu komencis verki la unuajn rakontojn kaj sendis ilin al kelkaj magazinoj. Tio vekis grandan intereson. Liaj mallongaj rakontoj pri malproksima Nordo fariĝis tre popularaj kaj materia situacio de London rapide pliboniĝis. Dum kelkaj jaroj li fariĝis ege populara verkisto, fama kaj riĉa.

En 1905, London aĉetis grandan ranĉon en meza Kalifornio. La distrikto estis tre bela kaj li priskribis tion en sia eble plej ĉarma libro "**La Luna Valo**" (*The Valley of the Moon*), tradukita al diversaj lingvoj. En la romano, juna geedza paro decidis ŝanĝi sian vivon kaj forlasi la urbon por serĉi trankvilan lokon meze de la naturo. Ili komencis tre longan marŝon kun tranoktoj en diversaj regionoj kaj fine trovas la ĝustan lokon por realigi sian revon. En pitoreska ĉirkaŭaĵo aperis tia areo, en kiu la juna paro volis tuj ekloĝi. Ankaŭ ĉi tiu libro enhavas aŭtobiografian fonon sed reala vivo ne estis tiel simpla.





"Lupa Domo" de London en Kalifornio

Kvankam London esperis fariĝi sukcesa farmisto, tamen havis neniun sperton por tia entrepreno. La elspezojn li povis pagi, ĉar havis multe da mono pro la sukcese vendiĝantaj libroj. De tempo al tempo li forveturis por kelkaj monatoj kio certe ne utilis al farmado. Malgraŭ ĉio, plibonigo de la bieno fariĝis lia pasio kaj tiucele London ekstudis librojn pri agrikulturo. Komencis konstrui multekostan ŝtandonegon, kiun nomis "Lupa Domo" – sed neniam ĝin finis pro la detrua brulego.

Fine de 1915, London forveturis al Havajo. Tio estis lia lasta vojaĝo, kiu daŭris ok monatojn. Somere 1916 li revenis, jam tre malsana kaj drinkema. Mortis antaŭ 100 jaroj, la 22an de novembro - pro malsanoj aŭ eble pro memmortigo.

Lia bunta vivo de aventurema vagabondo, maristo kaj orserĉanto fruktis per 24 romanoj, 120 rakontoj, 23 eseoj, 4 aŭtobiografiaj rememoroj kaj (eĉ) 3 teatraĵoj kaj 45 poemoj. Inter tiu abunda verkaro, la plej grandan sukceson alportis libroj pri la Nordo: "**Blanka silento**" /*The white silence*, "**La voko de la sovaĝa**" /*The call of the wild*, kaj "**Blanka Dentego**" /*White Fang*. Kiel reprezentanto de la naturalisma literaturo, London priskribis kruelecon de la sovaĝa naturo en arktika klimato aŭ inter la ondegoj de furioza maro. Vivo de bestoj (precipe de la nordaj sled-hundoj) estas lerte prezentita en liaj libroj, kio logis milionojn da legantoj el diversaj kulturoj kaj lingvoj.

Lia simpla stilo priskribi krudajn pejzaĝojn de malproksima Nordo inspiris aliajn verkistojn kaj fariĝis la motivo por multaj filmoj. Ankaŭ liaj aventuroj surmare iĝis la temo por libroj, kiu ĝuis grandan popularecon, ekz. *Ribelo de Elsinore* (The mutiny of the Elsinore) kaj *La marlupo* (The sea-wolf).




London havis malfacilan vivon kaj estis sentema pri sociaj problemoj. Tamen liaj filozofiaj kaj socialismaj priprenoj aspektas hodiaŭ eksmodaj kaj la malpacienca, impeta soifo je danĝeraj aventuroj kaŭzis la tro fruan morton. Vivante pli ol tiujn 40 jarojn, li certe povus riĉigi literaturon per aliaj atentokaptaj libroj.



Tiel aspektas ruinoj de la domo, en kiu Jack London volis ekloĝi. Post 100 jaroj, tiun lokon vizitas multaj turistoj. Por ili, oni organizas tie bankedojn, koncertojn, edziĝ-ceremoniojn ktp.

Dekstre videblas la titolpaĝo de "Martin Eden" – la duon-aŭtobiografia ĉefverko de J.London. Ekde la infanaĝo li ŝategis legi kaj poste kolektis pli ol 10 mil librojn. "Maristo sur ĉevalo" (*Sailor on horseback*) – tiel lin nomis la biografo Irving Stone.



Henryk Sienkiewicz (1846-1916)

Artikolo pri Sienkiewicz estos pli longa, ĉar liaj libroj estis pli bone konataj inter esperantistoj. La unuaj E-tradukoj aperis jam fine de la 19a jarcento kaj faris ilin tiaj eminentuloj de la esperanta literaturo kiel Antoni **Grabowski** kaj Kazimierz Bein (konata kiel "Kabe"). Sian kontribuon faris ankaŭ filino de Ludoviko Zamenhof – Lidia, kiu esperantigis rakontojn de Sienkiewicz kaj lian monumentan romanon "Quo Vadis". Ne eblas priskribi la tutan verkaron de Sienkiewicz sur kelkaj paĝoj, tial vi trovas ĉi tie nur koncizan mencion de liaj plej grandaj romanoj.



Henryk Sienkiewicz naskiĝis en vilaĝo Wola Okrzejska (inter la urboj Bjalistoko kaj Lublin). Jam en bazlernejo li lernis latinan lingvon kaj komencis legi verkojn de Tacito en ties originala lingvo. Tiam lin ekinteresis kulturo de antikvaj Romio kaj Greklando. Post mezlernejo Henryk komencis studi medicinon en Varsovio sed poste transiĝis al **departamento** filologio-historia. Dum la universitataj jaroj Sienkiewicz komencis verki kaj sendi siajn artikolojn al "Inluŝtrita Semajno-Revuo" (*Tygodnik Ilustrowany*) kaj al aliaj varsoviaj periodaĵoj.

Komence de 1876, Sienkiewicz vojaĝis kun grupo de siaj konatoj al Usono kaj de tie sendadis tre interesajn raportaĵojn. Tiutempe nur malmultaj veturis transoĉeane kaj en Pollando tiu materialo trovis multajn legantojn. Gazeto, kiu publikigis ilin en formo de artikoloj, saviĝis tiel el serioza krizo. Poste la tuta kolekto aperis libroforme sub titolo "Leteroj el vojaĝo tra Usono" (*Listy z Ameryki*).

Spertoj pri tiu vojaĝo utilis al Sienkiewicz por verki kelkajn novelojn: *Por pano* (Za chlebem), *Latarnisto* (Latarnik), *Orso*, *En lando de oro* (W krainie złota), *La komedio de eraroj* (Komedia pomyłek), *Rememoroj el Maripoza* (Wspomnienia z Maripozy) kaj *Sachem*. Somere 1881, Sienkiewicz edziĝis kun Maria Szetkiewicz; sekve al ili naskiĝis filo Henryk-Józef kaj filino Jadwiga-Maria. Bedaŭrinde, en jaro 1885 la juna edzino mortis.

Por ne subiĝi al deprimado, la ĉagrenita verkisto eniĝis al intensa verkado kaj dum apenaŭ kelkaj jaroj aperis la dika, pli ol 1000-paĝa "**Trilogio**" kiun konsistigis jenaj historiaj romanoj:

- *Per fajro kaj glavo* / "Ogniem i mieczem" - pri la milito kontraŭ la kozakoj kaj tataroj en la t.n. "Sovaĝaj Stepoj" (la teritorio situata norde de la Nigra Maro). Dum kelkaj jarcentoj, regule ĝin trapasis mongolaj hordoj por ataki Eŭropon. Pro tio la stepoj estis nenies lando, kun la portempa loĝantaro miksitaj el diversaj popoloj.
- *La diluvo* / "Potop"- pri defendo de Pollando kontraŭ la sveda invado.
- *Sinjoro Volodijovski* / "Pan Wołodyjowski" - pri invado de turkaj armeoj en Suda Eŭropo kaj venko super ili apud Vieno, septembre 1683 (tio estis unu el la plej gravaj bataloj en la historio).

Fine de la tri epopeoj, Sienkiewicz konfesis: "Per granda peno mi kreis tiujn librojn – por kuraĝigo de la koroj". Li volis donaci esperon al siaj samlandanoj pro tio, ke Pollando ne ekzistis tiam sur eŭropa mapo ekde pli ol 100 jaroj, ĉar dispartigis ĝin la tri najbaroj (Germanujo, Ruslando kaj Aŭstrio). Valoras aldoni ke, malgraŭ tiel seriozaj temoj, Sienkiewicz abunde ornamis la "Trilogion" per amuzaj scenoj, originala lingvaĵo kaj spritaj dialogoj.

" Tra dezerto kaj praarbaro"



En januaro 1891 Sienkiewicz veturis al Afriko. Tiu vojaĝo havigis al li abundan materialon por *Tra dezerto kaj praarbaro* - la dufoje filmigita romano. Multegaj geknaboj tuj ekŝatis tiun libron pro la majstre priskribita ekzotika naturo, kortuŝaj scenoj kaj amuzaj situacioj.

La eventoj okazas meze de la 19a jarcento, kiam daŭris konstruado de Sueza Kanalo, per kiu la marvojo inter Londono kaj Bombay (*Mumbajo*/ Mumbai) mallongiĝis je pli ol 7,300 kilometroj. La konstruadon gvidas du inĝenieroj, anglo Rovlison kaj polo Tarkovski. Tiutempe daŭris bataloj kontraŭ la brita kolonia registaro kaj unu el lokaj triboj forkaptis iliajn du infanojn: 14-jaran Staĉjo Tarkovski kaj 8-jaran Nel Rovlison. Post kelka tempo, Staĉjo kaj Nel sukcesis fuĝi el la kaptejo sed ili devas trairi tre longan vojon tra Nordorienta Afriko.



Filmo produktita en jaro 1973, surbaze de "Tra dezerto..."

Staĉjo devas zorgi pri sekureco de la knabineto: li batalas kontraŭ la sovaĝaj bestoj, akiras ĉiutage manĝaĵon, savas elefanton el ravino, kuracas Nel de febzo. Sekve aliĝas paro de junaj nigruloj: Kali kaj Mea kaj la infanoj, post tre longa marŝado kaj subĉielaj tranoktoj, retrovas siajn patrojn.




Inter la multlingvaj tradukoj, kelkaj videblas supre: en la franca, hispana, angla kaj esperanta lingvoj.

Aventuroj de Staĉjo Tarkovski, Nel Rovlison, ilia hundo Saba kaj la afrikaj geamikoj fariĝis klasikaĵo de la porjunulara literaturo. La libron esperantigis prof. M.Sygnarski, lektoro de Esperanto ĉe Jagielona Universitato. Tiu romano estis dufoje filmigita (en 1973 kaj en 2001) sed tiu unua ekranigo ŝajnas esti pli bona, i.a. pro la bela muziko: (3:34) <https://www.youtube.com/watch?v=gr3MoFpqU0g>. Eble ĝi memorigos al vi feliĉajn jarojn de la infanaĝo.

"La teŭtonoj" (Kruckavaliroj)


En 1885, Sienkiewicz komencis verki romanon "La Kruckavaliroj" - pri militaj konfliktoj inter la germana teŭtona ordeno kaj Pola Reĝlando. La teŭtonajn Kruckavalirojn invitis Mazovia princo en la 13a jarcento, ke ili helpu batali kontraŭ barbaraj prusaj gentoj. La teŭtonoj komencis perforte konverti la prusojn, uzante armilojn kaj bruligante iliajn vilaĝojn. La persekutitajn gentojn defendis Paŭlo Vlodkovic (*Paweł Włodkowic*), la reĝa juristo kaj profesoro de Jagielona Universitato en Krakovo. Sed la teŭtonoj ne rezignis je siaj metodoj.



Hungara eldono

Post jardekoj, ili transprenis pli kaj pli da teritorioj kaj fine tiel fortiĝis, ke komencis minaci Pollandon. La libro finiĝas per batalo ĉe Grunwald, kie armeoj de pola reĝo Vladislao Jogajlo (ĉ. 18,000 viroj el Pollando, Litovio kaj Ruslando) disbatis la Kruckavalirojn, kiujn apogis proksimume 26,000 viroj el diversaj germanaj graf-armeoj kaj el aliancigitaj kun ili landoj.

Multaj figuroj de la romano vivis reale, ĉar tion konfirmas la originalaj fontoj de tiu epoko. Verkante tiun libron, Sienkiewicz komparis la historiajn dokumentojn, kiujn skribis la tiamaj kronikistoj en pola, germana kaj franca lingvoj.



Eldono en angla lingvo

Inter la historiaj eventoj, la verkisto priskribis tragedian amon inter juna kavaliro Zbiŝko kaj knabino Danjo (Danusia, filino de pola nobelo Jurand el Mazuria regiono). La teŭtonoj inside katpis Jurand, fajre lin blindigis, dehakis lian manon, bruligis lian domon kaj forkaptis Danjon. En la kastela obskura kelo ŝi ekmalŝanis kaj baldaŭ mortis.



Danjo deklaras ke Zbiŝko estas ŝia fianĉo




Blinda Jurand ĉe sia morta filino

En unu el postaj ĉapitroj videblas la kor-skua sceno: la reĝaj limgardistoj kaptis unu teŭtonon kaj ŝnure lin ĉirkaŭnodis. Sekve ili veturigis la katenitan kavaliron al blinda Jurand al kiu ili donis glavon, ke li revengu kaj mortigu la kaptiton. Jurand proksimiĝis, tenis la glavon super la brusto de la kuŝanta teŭtono kies okuloj rondegis pro angoro. Post longa, morta silento Jurand rezignis je la venĝo, demetis la glavon kaj lasis la kaptiton viva.

La romano estis tradukita en 25 lingvojn (jam komence de la 20a jarcento ĝi aperis en la ĉina). Por la 550-a jubileo de la batalo ĉe Grunvaldo (*Grunwald, la 15an de julio 1410*), surekraniĝis la monumenta filmo, impona pro la bunte prezentitaj figuroj kaj impetaj bataloscenoj. Por filmado oni bezonis 10 mil homojn kaj preskaŭ 500 ĉevalojn sed la rezulto estis vere impresa. Rigardis ĝin pli ol 30 milionoj, kio instigis multajn or, eble denove, tralegi la libron.

Dekstre: franca filmafiŝo de "La teŭtonaj kavaliroj" >

En jaro 1900 Sienkiewicz celebris la 25-jaran datrevenon de la verkista laboro kaj tiam la dankemaj legantoj donacis al sia granda verkisto la palacon kun bieno Oblegorek en suda Pollando kaj poste li disponigis ĝin al orfejo. Tiutempeli estis elektita membro i.a. de Ĉeĥa Scienc-Akademio.




"Quo Vadis"

Tra vasta panoramo de la forpasanta Roma Imperio, fadenas la romantika temo pri granda kaj pura amo. Romia patricio Vinicius enamiĝis al Ligia, kiu devenas de iu mezeŭropa gento.

En la unua jarcento, dum regado de la sadista Neron martire mortis miloj da kristanoj kaj la ĉefurbon detruis brulego. Li akuzis pri tio la kristanojn, kio efektivigis ilian persekutadon. Sekve oni komencis ĉasi la akuzitojn kaj la trovitajn grupigis en amfiteatra Koloseo por ke la sang-avidaj bestegoj (leonoj, ursoj, tigroj) ilin disŝiru kaj finvoru.

Inter ili troviĝis ankaŭ Ligia, katenita al uro sed ĵus last-momente alkuris fortega sklavo Ursus kiun mortigis la uron kaj savis Ligia. Kaj sekvas la mirinda priskribo de tiu amo:



"Vinicius flotis antaŭe kun peno, kontraŭ la tempofluo li batalis kaj laciĝis. Nun li aliĝis kun la ondo kaj kredis, ke ĝi portas lin al eterna silento. En sia imago, li ekvidis sin kunpreni la manon de Lidia kaj tiel ili ambaŭ foriros al ĉielo, kie Kristo ilin beatos kaj permesos ekloĝi en lumo trankvila kaj tiel potenca, kiel briloj de aŭroro. La homoj ĝis nun ne konis Dion, kiun ili povus ami; tial ili ne kapablis ami unu la alian. De tie venis ilia mizero ĉar kiel lumo radias de la suno, tiel feliĉo fontas el amo.

En momento, ili ambaŭ silente iris kaj ne povis plene enspiri tiun feliĉon. Enamiĝintaj reciproke, ili similis al du diaĵoj – belegaj kvazaŭ ilin printempo naskus kun floroj. Ligia ekrigardis al Vinicius kaj diris: - Mi estas ĉe vi. Kaj li respondis: - En sonĝo mi vidis animon vian".



Dume la pereonta Neron subiĝis senbride al perversaj plezuroj. Lian hedonisman vivstilon imitis la tiama aristokratio kaj tiel komenciĝis longdaŭra disfalo de la 500-jara imperio – unu el plej potencaj en historio de la homaro. La vortoj "quo vadis" fariĝis konataj kiam s-ta Petro volis eviti torturojn kaj provis fuĝi el Romo. Tiam survoje li renkontis Kriston, kiu iris en kontraŭan direkton – al Romo. Mirigita Petro demandis "Kien vi iras, Sinjoro?" (*Quo vadis, Domine?*) kaj ekaŭdis la respondon: "Al Romo, por esti krucumita denove". Tio skuis la konsciencan de Petro, kiu tien tuj revenis kaj mortis martire.



Busto de Sienkiewicz ĉe via Appia




Via Appia – la reĝino de antikvaj romiaj vojoj

Tiu antikva vojo hodiaŭ nomiĝas Via Appia kaj, sudoriente de Romo, promenas sur ĝi la turistoj serĉantaj trankvilan lokon ekster la brua urbego. Nur je 3-kilometra distanco de la urbocentro, sub la numero **via Appia 51**, oni povas eniri la ĉapelon "Domine Quo Vadis" kaj ekvidi la buston de Sienkiewicz.

La verko prezentas la etikan ideon, ke morala konduto venkas fizikan perforton.

"Quo Vadis" estis eldonita en 70 landoj, tradukita al 57 lingvoj, inkluzive la japanan kaj araban.




Bonege tiun libron esperantigis Lidia Zamenhof, la plej juna filino de la Majstro.

Laŭ opinio de kritikistoj, ŝia traduko estas "*glata, facilflua, bonege ekvilibrata kaj kristale klara*".

Ni ne disponis pri la E-versio, tial la komence aldonita citaĵo ne estas de ŝi tradukita.

Oni povas diri ke - pro sia universaleco - *Quo Vadis* kronis la verkadon de Sienkiewicz. Entute, ĝi aperis diverslande en pli ol 2,000 (jes, du mil) eldonoj. Tiu ĉefverko estis adoptita al teatraĵoj, inspiris multajn pentristojn kaj sur ĝia bazo oni kreis eĉ operon. Dum jardekoj, la romanon rigardis milionoj sur ekranoj - en italaj, usona kaj pola filmoj. En jaro 1905 H.Sienkiewicz ricevis literaturan Nobel-premion. Tiuj grandaj sukcesoj ne blindigis la verkiston, kiu restis sentema pri socia justeco kaj neniam forgesis pri la plej malriĉaj. Tiun malĝojan flankon de la vivo li prezentis ofte en siaj noveloj: *Skizoj per karbo* /*Szkice węglem*, *Joĉjo Muzikanto* /*Janko Muzykant*, *Bartek la Venkinto* / *Bartek Zwycięzca*, *Anĝelo* /*Jamioł*.



"Lasta preĝo de la kristanaj martiroj" – bildo de franca artisto J.L. Gérôme, pentrita en 1883.

Kiam eksplodis la unua mondmilito, Sienkiewicz forveturis al Svislando, tie li kunorganizis Helpan Komitaton por Viktimoj de la Milito sed mortis antaŭ ol tiu milito finiĝis. Post ok jaroj oni veturigis lian korpon al varsovia katedralo, kiun la germanoj detruis en 1944 – denove dum la mondmilito, tiam la dua. Komence de la pasinta jarcento, Sienkiewicz skribis al pariza gazeto: *Antaŭ ĉio, necesas ami sian patrujon kaj pensi pri ĝia feliĉo. Tamen la vera patrioto atentis, ke tiu amo ne estu kontraŭa al bonfarto de la homaro sed fariĝu unu el bazoj por la universala feliĉo. Nur tiam progreso de la patrujo estos akceptita tutmonde. Do la devizo de ĉiu patrioto devus esti tia: "Tra patrujo al homaro"*.

Tiu mallonga citaĵo simple klarigas, ke per amo al sia patrujo oni neniel rajtas ĝustigi militon kontraŭ aliaj nacioj. Natura ordo estas ami siajn gepatrojn kaj familion; poste la homo maturiĝas kaj lia amo pli vastas al patrujo kaj fine al ĉiuj homoj. Bedaŭrinde, hodiaŭ la ignorantoj ŝajnas miksi la nociojn de patriotismo kun naciismo aŭ eĉ kun ŝovinismo kaj nazismo. La plej fanatikaj elpensis eĉ "solvon" por ĉio: forigi naciojn, religiojn, detruu la familion kaj nur tiam oni kreas paradizon en la mondo. Sed tion oni provis fari jam en la pasinteco, ĉu ne? Unu el tiaj estis ankaŭ Neron, la imperiestro.

Reinventi pacon

Kun plezuro ni publikigas ĉi tiun artikolon, ĉar kontaktoj inter UEA kaj UNESKO (Organizaĵo pri Edukado, Scienco kaj Kulturo ĉe la Unuiĝintaj Nacioj) havas longan kaj bonan tradicion.



Meze de lasta novembro, en la Pariza ĉefsidejo de UNESKO oni celebris la 20an datrevenon de la *Premio pro la Porpaca Edukado*, kiun ricevis Chiara Lubich en jaro 1996*. Sed tio ne estis apenaŭ nostalgia rememoro pri la pasinteco. Ekde tiu tempo, en la mondo okazis drastaj ŝanĝoj: amasa migrado de popoloj, organizita terorismo, klimatsanĝo, dominado de avidaj firmaoj super naciaj merkatoj, financa krizo kaj la ĉie kreskantaj ŝuldoj, ekonomia malegaleco, emociplenaj elektoj en Usono. Tiuj ĉi gravaj problemoj aperis en la prelegoj kaj ĝustigis la elektitan titolon por la simpozio:

“Reinventi pacon”.

Vicprezidanto de Fokolaro, J.Moran komparis la mondan situacion al *vizaĝo agonia pro milito*. Fronte al tiuj tragedioj, pli kaj pli da homoj urĝe bezonas solvojn. La eventon partoprenis 500 personoj el diversaj landoj kun la celo malkovri la fundamentojn de la porpaca kulturo, formuligitajn dum la ceremonio okazinta tie antaŭ 20 jaroj.



A. Javed

Estis kuraĝige aŭskulti la voĉon de juna generacio en kies nomo parolis Arooj Javed, studentino en Departamento de Internaciaj Rilatoj: "Hodiaŭa junularo apiras fariĝi tiaj civitanoj, kiuj kontraŭas unuecon de la mondo". Tio certe kongruas kun la celoj de "Nova Homaro" / *New Humanity* – la movado kiu funkcias ĉe UNO kiel ne-registara organizaĵo (NGO) kaj estis unu el ĉefaj organizantoj de tiu grava evento.



Vicprezidanto de Fokolaro, J.Morán esprimis tion (komparis tian /tiun situacion kun) al *vizaĝo agonia pro militaj konfliktoj*, por kies urĝaj solvoj atendas pli kaj pli da homoj.

La vojo trovi pacon aŭ - laŭ fokolaro tradicio - vivi en unueco, gvidas tra konstruado de komunumo.



Supre, sur la malnataŭa muro videblas vico de malgrandaj fenestroj. Tie laboras multaj tradukistoj samtempe.

Kelkaj kaptofrazoj verŝis lumon je tiuj pripensoj: interkulturaj kontaktoj, universala amikeco, kunlaboro inter religioj, solidareco kun loka loĝantaro kaj – antaŭ ĉio – edukado pri kulturo de dialogo kaj paco.

Dum video-prezentaĵoj oni ekvidis ke "paco ne estas nur teorio aŭ revo, sed atingebla celaĵo. Tion oni spertas ekzemple en:

- Egiptio kie Asocio de Kristanaj kaj Islamaj Virinoj kreis fratnajn rilatojn kaj bone kunlaboras;
- en aliaj partoj de Afriko 40 entreprenoj funkcias laŭ EoC-principoj (Ekonomio de Libereco en Komunio);
- fokolaranoj vivantaj en siria Alepo dividas la sorton de la martira nacio; lernejo konstruita en Reife (Brazilo) konstruis ĉirkaŭe firman komunumon de infanoj kaj iliaj gepatroj.

Tiel aspektas nur kelkaj ŝtonetoj de la mozaiko dediĉita por antaŭenigi kulturon de paco kio estas unu el ĉefceloj de UNESKO. "Ni bezonas dialogi simile kiel en orkestro, kie ĉiu instrumento distingiĝas per sia propra sonkoloro. Tamen, la na celo ja estas ludi simfonion en harmonio kun la ceteraj" – parobolis poetike mons-ro Francesco Follo, la konstanta observanto ĉe tiu monda organizaĵo.

Kaj prezidanto de J.Delors-Instituto kaj eksa prezidento de Italio, s-ro Enrico Letta aldona ke "Por ke dialogo gvidu al interkompreno, oni devas memori, ke ĉiu el ni reprezentas nur minoritatan grupon kompare kun la tutmonda loĝantaro. (Tial...) ni povas lerni freŝan rigardon kaj malfermitecon de junaj homoj. Sekve ni komprenos ke edukado pri kulturo de dialogo estas nia baza tasko. Unu el lastaj proponoj skizis tre praktikan proponon: Al ĉiuj membroŝtatoj, ni antaŭmetu la kurson por instruistoj pri *Arto vivi laŭ globskala perspektivo*".



Dekstre: parolas prof. D.Badarch el Mongolio, direktoro de Fakoj pri Interkultura Dialogo ĉe UNESKO

*

Ĉi-sube vi povas legi la parolon kiu estis prezentita dum la menciita ceremonio, okazinta antaŭ 20 jaroj.

Akcepta parolo post ricevo de la Premio je Porpaca Edukado

Sinjoro Ĝenerala Direktoro de UNESKO,
Sinjoro Prezidanto de la Internacia Ĵurio,
Estimataj Ĝesinjoroj,

Unue mi salutas estime ĉiun partoprenanton kiu alvenis ĉi tien. Elkoran dankon al homoj kiuj decidis min honorigi per la prestiĝa *UNESKO-Premio por Pac-Edukado*.

Nun permesu, ke mi ofertas kelkaj pensojn al ĉi tiu respektinda asembleo. Hodiaŭ mi ne intencas paroli pri historio nek pri organiza strukturo de la Fokolara Movado kiu - kun multaj aliaj bonegaj organizaĵoj, iniciatoj kaj projektoj - servas kiel instrumento por konstrui unuecon kaj pacon sur nia planedo. Prefere mi diru kiel nia movado sukcesis.

Ĝia sekreto kuŝas en la nova vivstilo, kiun adoptis jam milionoj. Kvankam inspirita per kristanaj principoj, ĉi tiu ideo ekzistas paralele en aliaj kredoj kaj kulturoj. Mi parolas pri la nova spiriteco kiu servas unuecon kaj tial ĝi estas ĝustatempa kaj ĉiam aktuala. Fakte, al nia mondo ĝi jam portas fruktojn de paco kaj unueco.



.....



Ekde 50 jaroj, islamaj fokolaranoj vivas amikece kun kristanoj en Alĝerio

Oni rajtas prave demandi: kiel imagi pacon kaj unuecon en la mondo sen vidi homaron kiel unu familion? Kaj kiel familio povas ekzisti sen patro?

Tial do, radikoj de ĉi tiu vivstilo estas profunde ligitaj kun kelkaj frazoj en Evangelio: Dio estas Patro de ni ĉiuj kaj Li estas eterna Amo.

Multegaj respondas al tiu Amo kaj malfermas siajn korojn al Dio, kiu ne forlasas homojn en senelirejo sed volas ilin helpi. Survoje al renovigo de socio, Li subtenas noblajn klopodojn de la homoj, de ĉiu viro kaj virino.

Kredi... Kredante, oni elektas Dion kiel Idealo kiu pridonacas nin per sennombraj eblecoj survoje al nia fina destino: eterneco.

Ni scias, ke la unua deziro de patro estas ke liaj infanoj traktu unu la alian kiel fratoj kaj fratinoj, ke ili amu unu la alian kaj reciproke zorgu pri siaj vivoj. Ili sciuj tion kaj praktiku kiel *arton de amo*. Li volas ke ni iniciatu tiun amon sen atendi ke aliaj faros la samon.

Tiu ĉi arto de amo signifas, ke ni amas alian homon kiel nin mem ĉar – kiel diris Mahatma Gandhi

– **"Vi kaj mi, kaj ĉiu alia, ne povas vundi alian homon sen damaĝi sin mem"**

(Citaĵo el W. Mühs - "Parole del cuore", Milano 1996, p.82).



Dum la vojaĝo tra Sudorienta Azio en januaro 1997, parolojn de Ch. Lubich aŭskultis centoj da budhistaj monaĥoj.

Same dum la tempoj de Gandhi kiel hodiaŭ: kiu ajn provas movi la montojn de malamo kaj perforto, tiam li alfrontas grandan kaj pezan taskon. Sed kio superas la izolitan kapablecon de apartigitaj milionoj, tio montriĝas realigebla por homoj kies reciproka kompreno kaj unueco estas la motiviga forto de la vivo. Kaj por tio, ekzistas precipa kaŭzo: se Dio estas nia Patro, tiam lia Filo-Kristo estas frato de ni ĉiuj. Li pasigis al ni la deziron de la Patro ke "ĉiuj estu unu" (*Ut unum sint*). Do, al nia najbaro ni helpu porti lian ŝarĝon – ofte tro pezan por unu malriĉa, forgesita aŭ malsana homo. Tiumaniere, en niaj loĝlokoj, ni kontribuas krei unuecon kaj pacon en la mondo. Ni ekskludu neniu kaj sekve, paŝon post paŝo, ĉiu homo sentiĝu kiel membro de unu granda familio.

Tiu reciproka amikeco pridonacas nin per granda ĝojo eĉ kiam ĝi postulas trejnadon en ofta sinofero. Kio aperas al kristanoj kiel lumturo, por la egoista mondo ŝajnas esti absurdo kaj stultaĵo. Sed nenio valoras kaj fruktodona atingebblas sen peno kaj doloro! Por tiaj noblaj celoj kiel: protekti dignon de ĉiu persono, krei la senton de proksimeco inter la popoloj (eĉ kiam ilin disigas konfliktoj) kaj krei unuecon de la homaro – jen la vasta kampo al frateca kunlaboro".

Chiara Lubich

Ĉefsidejo de UNESKO en Parizo, la 17an de decembro 1996.

* Kelkajn monatojn antaŭ la UNESKO-premio (en junio 1996), Ch.Lubich ricevis la unuan honoran doktorecon ĉe KUL-universitato en Lublin. Samloke oni fondis ankaŭ riĉan E-bibliotekon.



En postaj jaroj, tiumaniere ŝin honorigis aliaj universitatoj en:

Argentino, Brazilo,
Filipinoj, Italio,
Meksikio, Malto,
Slovakio, Tajlando
kaj Usono.

Tiu jaro de 1996 gravas ankaŭ por "Nova Urbo" ĉar sekvasomere ŝi vizitis la UN-Organizaĵon en Novjorko kaj tiam ni ricevis aprobon eldonadi la E-lingvan version de la internacia magazino "Città Nuova" (*New City / Nouvelle Cite*). Sed pri tio ni publikigos ilustritan artikolon en alia numero.

*

Città Nuova /New City eldoniĝas ĉe Internacia Fokolar-Centro en Italio kaj aperas en multaj aliaj lingvoj /landoj: ARGENTINO - *Ciudad Nueva*; AŬSTRALIO - *New City*; BELGIO - *Nieuwe Stad*; BRAZILIO - *Ciudade Nova*; BRITUJO - *New City*; BULGARIO - *Nov Svjat*; ĈILIO - *Ciudad Neava*; ĈINIO (Hongkongo) - *San Sin Seung*; DANLANDO - *Ny Stad*; ESPERANTUJO - *Nova Urbo*; FILIPINOJ - *New City*; FRANCUJO - *Nouvelle Cite*; GERMANIO - *Neue Stadt*; HISPANIO - *Ciudad Nueva /Ciutat Nova* (en kataluna lingvo); HUNGARIO - *Uj Varos*; JAPANIO - *Uno*; KANADO - *Nouvelle Cite*; KENIO - *New City /Nouvelle Cite*; KOLOMBIO - *Ciudad Nueva*; KOREUJO - *Kumul*; KROATIO - *Novi Svijet*; LIBANUJO - *Citte Nouvelle*; NEDERLANDO - *Nieuwe Stad*; OCEANIO - *New City*; POLLANDO - *Nowe Miasto*; PORTUGALIO - *Cidade Nova*; RUMANIO - *Oras Nov*; SLOVAKIO - *Nove Mesto*; SLOVENIO - *Novi Svet*; SVEDIO - *Enad Värld*; SVISLANDO - *Citta Nuova*; URUGVAJO - *Ciudad Nueva*; USONO - *Living City*; VENEZUELO - *Ciudad Nueva*.

Nia Vilaĝo

Homo kaj naturo



En la titolpaĝa artikolo ni mencias pri **nub-arbaro** (konata ankaŭ kiel "fog forests" – nebulaj arbaroj), kiu kovras montojn en la nordorienta regiono de Kolombio. Tie vivas la unika etnogrupo de indianoj el *U'Wa-tribo* (en Esperanto: uŭa).



En la nubbarbaro amasiĝas nuboj, kies humida aero kondensiĝas kaj produktas nebulon. Pro dispartigo de la nuboj, la reala precipitaĵo (pluvokvanto) duoblas tie dum la sekaj jarsezonoj.

Meze de la pasinta jarcento, oni faris eksperimentojn pri akvocirkulado en nubbarbaroj. Tiam montriĝis, ke ĝia kanopeo (arbopintoj), forprenas kaj vaporigas 20% malpli da precipitaĵoj (pluvofaloj) ol en aliaj arbaroj. Rezulte, la grundo en plubarbaroj perdas malpli da akvo kaj pli bone konservas la akvobalancon.

Nubarbaroj kreskas inter la du tropikoj (la norda - Kankra kaj suda - Kaprikorna), en Latinameriko, Kariba Insularo, orienta parto de Mezafriko, Sudorienta Azio, Indonezio kaj Novgvineo.



Temperaturo en nubbarbaro estas iom pli malalta ol sur senarbaj ebenaĵoj ĉe la ekvatoro kaj tio kreas taŭgan klimaton por abunda plantaro.

Malaltaj kaj kurbiĝintaj arboj estas tie kovritaj dense per senradikaj plantoj (**epifitoj**, scienca nomo: Epiphytum – *planta aerea*). Kutime, en nubbarbaro kreskas ankaŭ grandegaj erikoj, senecioj (?) latine - *Senecio* L. kaj lobelioj (?) - lat.: *Lobelia* L.



Epifitoj (*Planta aerea*)



Senecio L.




Lobelia L.

Geografistoj dividas nia planedon je kvin ĉefaj zonoj (po 2 en ambaŭ hemisferoj /duongloboj):

- Du **subpolusaj** (1-a, inter norda poluso kaj arkta cirklo;
2-a, inter suda poluso kaj anarkta cirklo).
- Du **moderaj** (1-a, inter artktika cirklo kaj Tropiko de Kankro;
2-a, inter Tropiko de Kaprikorno kaj antarkta cirklo)
- Unu zono **sub-ekvatora** (inter la norda Tropiko de Kankro kaj suda Tropiko de Kaprikorno).

En tiuj kvin zonoj troviĝas diversaj klimat-regionoj, kiuj dependas de tri ĉefaj faktoroj: temperaturo, pluvofalo (humideco kaj vaporiĝo) kaj stabileco /ventoj. Ĉiun tipon de klimato karakterizas kaj plej bone spegulas plantaro, kiu kreskas nature en la respektiva regiono.



EkoLeksikone

(por ekologia leksikono)

Tiu ĉi mapo montras dividon de la regionegoj laŭ planta naturmedio:

- Tropika - helbruna,
- Dezerta – flava,
- Modera /mezvarma - verda,
- Polusaj (frostaj zonoj)
 - helblua,
 - griza (Gronlando, Antarktio).

Ĝenerale oni dividas nian planedon je kelkaj klimat-regionoj:

A. **tropika** /ofte humida – varmega

pluvarbaro(-j) – ĉiam verda, densa - proksime al ekvatoro, en: Amazonio, Sudorienta Azio, Oceania Insularo, Nordorienta Aŭstralio)

monsuna klimato – regula ritmo de sekaj someroj kaj pluvegaj vintroj (en Sudorienta kaj Suda Azio, Mezafriko, Mezameriko kaj Karibio)

savano – herbaj ebenaĵoj, foje kun altaj duonarbaroj /nur mallonga pluvsezono printempe (sur vastaj teritorioj de Mezafriko, Mezameriko, Hindujo kaj Orienta Aŭstralio).

B. **seka** /arida

dezerto – la plej seka, ekstreme varmega kaj "malamika" al ĉiuj plantoj (en Meza Azio, ekz. Mongolio, Hindujo, Irano; en Norda kaj Meza Afriko; Meksikio kaj suda Usono, argentina Patagonio; en meza Aŭstralio).

stepo – ofte surkreskita de herboj, nesufiĉa pluvado por arboj (en Eŭropo: sudaj partoj de Portugalio kaj Hispanio, meza Sicilio kaj Greklando; en Arabia Duoninsulo, Hinda subkontinento. Similaj estas: 1/ **preĝo**, meze de Norameriko kaj 2/ **pampo**, en la sudangulo de Brazilo, en Urugvajo kaj mezorienta Argentino).

C-1. **modera** /mezvarma, en kiu jarsezonoj klare distingeblas.

oceana /apudmara klimato – kutime milda, kun ofta pluvado kaj relative malgranda diferenco inter la temperaturoj de vintro kaj somero.

mediteranea – varma, seka somero kaj pluva vintro ("regas" laŭ bordo de Mediteranea Maro kaj sur okcidentaj bordoj de Nordameriko)

C-2. **kontrasta** (?), nia vort-eltrovaĵo

kontinenta, malproksima de maro- kun tre varmaj someroj, malvarmaj kaj ventaj vintroj.

montara (temperaturo kaj plantoj varias, konforme laŭ alt-zonoj /*mont-etaĝoj*: ju pli alte, des pli malvarme.

Inter la montopintoj blovas fortaj ventoj, ofte aperas nebulo kaj la ĉielon kovras nuboj. Vintroj estas longaj kaj malvarmaj; someroj – mallongaj kaj freŝaj. Dum somero tre malsamas temperaturo taga de la nokta Tia klimato ekzistas en ĉiu kontinento, ekz. en Karpatoj, Pirenea Montaro, Etiopa Altaĵo aŭ Tibeta Altaĵo.

Ĉi tie ni povas aldoni **altmontaran** klimaton, kun ties multe plej severa aero en: Himalaja Montaro, Alpoj, Andoj kaj Roka Montaro en Nordameriko.

D. **polusa** – norde, subarktika (plej nordaj insuloj de Kanado, triono de Gronlando kaj norda rando de Siberio).

La **suda** poluso troviĝas meze de la "blanka kontinento" nomita Antarktio. Polusa klimato havas nur du sezonojn: tre longan vintron kaj malvarmetan someron, kiu daŭras apenaŭ 3 monatojn. Tiun klimazon karakterizas la ĉiam frosta grundo, glacitavolo aŭ glaĉero. Vintra temperaturo falas ĝis 50 gradojn sub zero en Arktiko kaj ĝis -80°C en Antarktio, kie ventego hurlas kun rapideco de 90 kmj/h. Sude de la norda poluso etendiĝas **tundro** (en siberia dialekto de la rusa ĝi signifas "altaĵo" kaj laŭ finna lingvo *tunturi* – "kalva monto"). Tio estas la senarba areo de norda Siberio, en kiu nur linkenoj kaj muskoj povas kreski. Somere la tundra grundo degelas tre malprofunde, kio ebligas frukti al du arbustoj: **empetro** (? latine - *Empetrum nigrum* L; angle – black crowberry) kaj **ursa berujo** (? latine – *Arctostaphylos alpina* / ang - mountain bearberry). Pli sude, proksime al ekstera tundrolimo, oni trovas unuopajn arbustojn kaj pinglajn nan-arbetojn.